Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**05-a de aŭgusto 2020, numero 8**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Virtuala Ekskursa Tago: ok ekskursoj en kvin kontinentoj dum tri horoj

Amri Wandel
Turista gvidanto. Licencita de la Israela turisma ministerio ĉiĉeroni (i.a.) en Esperanto

Merkrede inter la 12-15 UTC okazis dum la Virtuala Kongreso ok ege variaj kaj diversstilaj ekskursoj. Amri Wandel, la kunordiganto kaj gastiganto de la ekskursa programo jene klarigis la ideon de virtualaj ekskursoj: "esperantistoj prezentas siajn urbojn/landojn kvazaŭ reale, en la plej turismaj anguloj de la terglobo. Diference de la tradicia Ekskursa Tago dum UK, kiam oni vizitas la kongreslandon, dum la VK la kongrslando estas la tuta mondo."

Sekvis serio de ok ekskursoj, kiuj daŭre estas spekteblaj en la kongresa programo (krampe la ĉiĉerono).

- **Jerusalemo** (Amri Wandel): sankta urbo de tri religioj
- **Montrealo** (Ĵenja Amis): ses kvartaloj de la kongresa urbo de 2022
- **Tanzanio** ( John Magessa): la koro de Afrika naturo
- **Pekino** (Rafael Zerbetto): la Somera Palaco
- **Venezuelo** (Jezer Durante): natura juvelo en Sudameriko
- **Parizo** (Francois Lo Jacomo): promeno tra la Urbo de Lumoj kaj Unesco
- **Tehrano** (Keyhan Sayadpour kaj Ahmad): la ĉefurbo de Irano
- **Elsah, Usono** (Duncan Charters): hejma vizito kun la prezidanto de UEA.

Tiu senprecedenca projekto estis plenumita dum malpli ol unu monato, dank' al la fervoro kaj sindediĉo de miaj kunlaborantoj tra la mondo. Kelkaj el la ekskursoj estis registritaj kaj finmuntitaj malmultajn tagojn antaŭ la komenciĝo de la VK. Pluraj estas profesi-nivelaj, aliaj amatorecaj, sed ĉiuj preparitaj per amo kaj sindediĉo. Koran dankon al ĉiuj!

## Via gastiganto :)




**La respektivaj fotoj troviĝas en la lasta paĝo**

**Alianco 365** estas plano por monata konstanta donacado al UEA. Laŭ tiu plano donacantoj pretas donaci po 31 EUR monate al la Asocio, **kio egalas donaci po nur 1 EUR tage**. Alternative donacantoj povas fari unufojan donacon de 365 EUR por la kuranta jaro.

La celo de la plano estas garantii al nia Asocio financan ekvilibron, kontribuante por pozitiva jara rezulto, kio signifas daŭripove ebligi al UEA plenumi sian mision. La destino de la donacoj estas ekskluzive la Ĝenerala Kaso de UEA, kiu nutras la rutinan laboradon de la Asocio.

**Kiel donaci?**

**Per banko:**

UEA-konto en
ABN-Amro Bank,
IBAN-numero: NL86
ABNA 0426 9014 44,
BIC: ABNANL2A


Per Paypal: vidu detalajn instrukciojn ĉe la Reta Revuo – https://revuoesperanto.org/alianco_365.

# Evoluigo kiel kolono de Unuiĝintaj Nacioj

Mark Fettes

*Enkonduka prezento de Mark Fettes pri la temo de MondaFest' 2020: "UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo" (unu el tri prelegoj pri la ĉefaj "kolonoj" de UN: paco kaj sekureco, homaj rajtoj, kaj evoluigo)*

## Evoluigo kunlige kun la fondo de UN



*Evoluigo*, aŭ kiel oni ofte nomas ĝin, *disvolviĝo*, aperas en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj sub ties Ĉapitro IX, "Internacia Ekonomia kaj Socia Kunlaborado." La unua artikolo de tiu ĉapitro prezentas la ĉefajn celojn de UN sur tiu kampo:

a. la altigo de la vivnivelo, plenlaboreco kaj kondiĉoj de ekonomia kaj socia progreso kaj disvolviĝo;

b. la solvo de internaciaj problemoj de ekonomia, socia, publiksana aŭ simila karaktero; kaj internacia kunlaborado pri kulturo kaj edukado; kaj

c. universala respekto al kaj observado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio.

En la tuj posta Ĉapitro X, la Ĉarto starigas la Ekonomian kaj Socian Konsilion de UN, la kunordigan organon sur tiuj vastaj kampoj de socia agado. Mi menciu parenteze, ke "Ekosok," kiel oni kutime nomas ĝin, estas la ĉefa branĉo de UN kun kiu UEA kaj la Esperanto-movado havas oficialan rilaton. Tamen, jam en la tempo de la fondo de UN oni komprenis, ke necesos krei diversajn "specialigitajn instituciojn" kun pli klara fokuso al diversaj aspektoj de "ekonomia kaj socia progreso kaj disvolviĝo." Tiel okazis, kaj tial estas mafacile nur kelkvorte resumi la komplikan 75-jaran historion de la evoluigaj streboj de UN. Kompare kun la kolonoj de paco kaj sekureco, aŭ la kolono de homaj rajtoj — ambaŭ ja sufiĉe multflankaj, sed relative koheraj en sia koncepta strukturo — la kolono de evoluigo pli similas al disbranĉiĝanta arbo, kreskanta en plej diversajn direktojn kaj portanta grandan sortimenton de fruktoj, pri kiu neniu ĝardenista teamo havas kompletan superrigardon.

Krome ni devas konstati, ke UN kiel tuto ne estas la plej influa internacia institucio sur la kampo de evoluigo, almenaŭ ne se ni pensas unuavice pri *ekonomia* evoluigo. La Monda Banko kaj la Internacia Mona Fonduso estas starigitaj pli-mapli samtempe kun UN, kaj ili fariĝis la plej gravaj fontoj de financado por la pli malriĉaj landoj. Malsame ol en UN, la membraj ŝtatoj de la Monda Banko kaj la IMF ĝuas voĉon proporcian al siaj buĝetaj kontribuoj, tiel ke ambaŭ institucioj regas la riĉaj landoj de la norda hemisfero. Pro tio, la diversaj branĉoj de UN ofte funkciis kiel forumoj por disvolvi alternativajn konceptojn de evoluigo, pli orientitajn al la realaj sociaj kondiĉoj de la t.n. evolulandoj, ol al la ideo, ke ĉiuj landoj troviĝas sur vojo kiu kondukas al usoneca industria konsumsocio.

## Evoluigo tra sep jardekoj

Indas memori, ke en 1945 la mondo havis multe malpli da sendependaj ŝtatoj. Kvindek ŝtatoj partoprenis en la fondokonferenco de UN en Sanfrancisko; inter ili, nur du afrikaj (Etiopio kaj Sudafriko), du el Oceanio (Aŭstralio kaj Novzelando), kaj du el Orienta Azio (Ĉinio kaj Filipinoj). La koloniaj potencoj – unuavice Britio, Francio, Nederlando, Portugalio – pretendis paroli por siaj teritorioj en ĉiuj regionoj de la terglobo, kaj ankoraŭ pensis pri evoluigo en tiu koloniisma kadro. Iom post iom montriĝis, ke la kolonia epoko venas al definitiva fino; tra la kvindekaj, sesdekaj kaj sepdekaj jaroj, preskaŭ ĉiuj iamaj kolonioj sendependiĝis (foje relative pace, foje nur per sanga lukto) kaj aliĝis al UN, tiel ke hodiaŭ la Organizo havas 193 membrajn ŝtatojn.

**(Daŭrigo sekvas...)**

Vi povas esti aŭtoro de la *Festivala Kuriero* kaj la Reta Revuo!
Por kontribui, skribu al la redakcio
*redakcio@revuoesperanto.org*

# Internacia Reto de Universitatoj

D-ro Orlando E Raola



Okazis neformala kunsido de grupo de universitataj profesoroj kaj esploristoj kiuj klopodas la starigon de Internacia Reto de Universitatoj. Se vi iel rilatas al la agado de Esperanto kaj universitatoj, ni kore invitas vin aliĝi al la dissendolisto *universitato@groups.io* kaj vi povos tuj kunlabori en la grupo. Dankon!

# Esperanto en Afriko

Okazos prezento pri la afrika bulteno "Esperanto en Afriko" ĵaŭde, la 6-an de aŭgusto 2020, ekde la 10-a horo UTC en la Virtuala Kongreso (VK). Venu babili ĉe vidbabilejo kun la redaktoro pri la sola periodaĵo redaktata de afrikano en Afriko por informi pri Esperanto.




Ni antaŭĝojas vian partoprenon kaj dankas vin.

# TADEN 25-jara

Rob Moerbeek



Post alvoko kun-agadi por senfuma medio, nia pioniro Jiři Rada ricevis malmultajn reagojn. Li mem, ĉeĥa ministo, suferis pro la fumado de kolegoj, kiuj eĉ pli venenis la jam malpuregan minejan aeron. Lin asistis Bart Ruigrok, delegito pri fervojoj kaj sindikatismo, sed ankaŭ volontulo en la biblioteko de UEA. Li eldonis ekde julio 1995 la unuajn tri numerojn de "Ni kaj niaj PURAJ PULMOJ". Baldaŭ elĉerpiĝis kaj financoj kaj fortoj, do ili petis transpreni la laboron. Tio sukcesis en la Praga UK, kiam UEA disponigis salonon por la fonda kunveno de TADEN, ne plu "Tutmonda agado..." sed "...Asocio de Esperantistaj Nefumantoj". La prezidon prenis sur sin Nora Moerbeek, aktivulino inter blinduloj. UEA ankaŭ disponigis konton, tiel ke eblis enkasigi kotizojn. Tamen rezultis nur deficitoj. (Lastatempe ret-abonoj ege helpas malpliigi tiujn.) Ŝin motivis, ke la unua edzo fumblovadis al la filo, kiu junaĝa forpasis. Nur du jarojn ŝi eltenis. Jam en 1998 ŝi mortis. Tiam transprenis la prezidon Esperanto-adepto ŝia: Jan Bemelmans, kiu samtempe iĝis prezidanto de Nosobe, la nederlanda sekcio de LIBE.

Ĝuste en nia loĝloko Beverwijk agadas du pulmistinoj, kiuj kunsufere kun siaj kancerpacientoj batalis por plibonigo: ilia kliniko rikoltis 50%-an sukceson pri malkutimigo. Ili ricevis laŭdon, sed ankaŭ eligon el la Alianco por senfuma generacio (ekde 2030, espere), kiu takte-lante progresis.

Pliboniĝas la publika sinteno; ankaŭ la amasmedioj, kiel konstatas Jan Bemelmans, pli negative traktas tabakismon. Tamen ankoraŭ oni ekspluatas infanlaboron en la tabakkultivejoj: duondiurne lernejaĝuloj laboras sub senkompata suno, eĉ en Usono.

Cigaredmagnatoj malpli sukcesas en procesoj: Urugvajo gajnis kontraŭ *Philip Morris*, kies kompens-postulego (pro sanleĝoj) ruinigus la landon (2014).

Sed jam necesas ke pli juna forto transprenu la laboron por TADEN de 84-jarulo jam tro okupata. Kiu volas surpreni laboron, skribu al moerbeekr@gmail.com. La sama adreso taŭgas, se vi simple volas ricevi la numerojn de "Puraj Pulmoj": gravas informi kaj esti informata.

(Ĉi tio estas resumeto de la jubilea numero)

**"Longan legaĵon" pri la sama temo trovu ĉe la Reta Revuo: https://revuoesperanto.org/taden**

# La ekskursa tago



Jerusalemo




Venezuelo



Montrealo




Parizo



Tanzanio



Teherano




Pekino



Elsah (Usono)